



N-ro 26 20.9.1973 kvina jaro, n-ro 3

Afergvidanto de AREK: Ivar PAULSSON, Algatan 3, S-171 33 SOLNA (Svedujo), p.ĉ.k. 51 57 85-4; redaktoro de "Fenikso": d-ro Antonio DE SALVO, via Olbia 15, I-00182 ROMA (Italujo); jara kotizo: 10 respondkuponoj aŭ egalvaloro (interesitoj en landoj kun transpagaj problemoj kontaktu la redakto ron, kiu klopodos trovi solvon).

KELKAJ VORTOJ DE LA AFERGVIDANTO

Per ĉi tiu numero AREK transpasis sian unuan kvinjaran periodon. Postrigardo: nia amika rondo de intersemuloj pri E-kolektado konsistis komence el 14 membroj; la unua celo estis, ke la nombro kresku ĝis 25, dum nun ni esperas baldaŭ atingi la nombron de 75. Ne nur la kvanto, sed ankaŭ la kvalito de membroj kreskis. La AREK-anoj scias, ke ili povas ricevi bonajn informojn kaj konsilojn en la kolektado. Dank'al niaj senlacaĵ redaktoroj, unue JENSEN kaj nun DE SALVO, estas farita granda laboro, por ke "Fenikso" aperu en bona vesto kaj kun interesa enhavo. Ĉiuj AREK-anoj ege dankas pro tio. Kiel afergvidanto mi esperas, ke AREK bone transpasos ankaŭ la duan 5-jaran periodon.

Ivar PAULSSON, Solna (Svedujo)

GLUMARKA KATALOGADO

Post la forpaso de nia kara kolego JENSEN, la afar gvidanto de AREK proponis al mi la daŭrigo de la katalogado de la diversaj glumarkoj eldonitaj pri aŭ por esperanto: mi akceptis tiun proponon, kvankam mi ankoraŭ ne havas grandan kolekton de glumarkoj.

Mia plano estas la katalogado laŭ la enkonduko de la dua eldono de la katalogo (1968) paĝoj: I. II. III. Sed mi mem, sola, povas nenion fari se ĉiu unuopa esperantisto, ĉiu loka grupo, naciaj aŭ internaciaj movadoj ne transdonas al mi informojn aŭ specimenojn de la nov-eldonitaj glumarkoj.

Mi proponas do al ĉiuj komenci la liston per la unua numero: 774 de la jaro 1972. Komprenoble, se aliaj nekonataj glumarkoj antaŭ tiu dato estas malkovrataj, ankaŭ ili estas bonvenaj kaj listigitaj inter la aliaj numeroj.

Bonvolu sendi viajn informojn al mia adreso (afranku ĉiam filatele, dankon!): Amika Rondo de Esperantistoj kolektantoj, ĉe s-ro Gaston TREMON, 31 rue Turgot, F-87350 PANAZOL (Francujo).

En la kadro de "Fenikso" mi donos resumon de la informoj, petante de ĉiuj korektaĵojn pri diversaj eraroj, forgesoj aŭ aliaĵoj. Ĉar la katalogo "JENSEN" estas necesa ilo por la kolektantoj, eĉ ne-esperantistaj, mi kalkulas pri via helpo kaj antaŭfankas. La represo de ĉi tiu informo, eĉ resume, estas dezirata en la esperantista gazetaro.

P. S. Kiu povas proponi al mi unu serion de la bulteno "La Glumarko-kolektanto"?

Gaston TREMON, Panazol (Francujo)

FALSAJ "ESPERANTO-FILATELAĴOJ"

Bedaŭrinde la 4-a E-renkontiĝo, aranĝita okaze de la internacia ekspozicio de p.m. okazinta en HODONIN (Ĉeĥoslovakujo) la 13-an kaj la 14-an de aprilo 1973, ne ricevis la antaŭviditan porokazan poŝtstampon.

La eventon memorigis "tutaĵo". Temas pri normala-oficiala poŝta karto kun enpresita marko je 30 h kiu, post aĉeto ĉe la poŝto, ricevis, presite, E-tekston. Kiu ne avertite ricevas similan karton povas supozi, ke ĝi estas aŭtentika poŝta eldono, dum ĝi estas nur privata aranĝo. Tiaj miseldonoj povas, do, esti danĝeraj por la bona reputacio de nia fako. Ekzistas sufiĉe da aŭtentikaj Esperanto-poŝtmarkoj, poŝtstampoj kaj poŝttutaĵoj kolektindaj kaj ekspoziciindaj sen "krei" si mem novajn. La solvo ja estas tro facila.

La kazo de Hodonin ne estas izolita. Oni jam parolis pri svisaj poŝtkartoj kiuj, post aĉeto, ricevis surprese E-tekston. Mi posedas ankaŭ germanan poŝtan karton kun enpresita marko je 10 pf kiu ricevis, presite, la emblemon de la germana E-Kongreso, kiu okazis en Göttingen en 1949. Kiamaniere klasifiki tiajn privatajn aranĝojn? Laŭ mi kiel simplaj esperantaĵoj. Kompreneble oni ne devas ilin envicigi en serioza katalogo, kiu enlistigas oficialajn E-filatelaĵojn.

Jean AMOUROUX, Perpignan (Franĵujo)

Esperanto-Ekspozicio en Hodonin

Estis prezentitaj tri kolektoj pri la temo "Esperanto". Kolekto "Historio kaj nuntempo de Esperanto", de s-ano Dolfá Baĝošik el Praha ricevis orumitan medalon kun honorpremio por plej bona kolekto en tema klaso. Kolekto de Vláda Hasala el Hodonin "Esperanto en filatelio" ricevis arĝentumitan medalon. Trian kolekton ekspoziciis s-ano Jaroslav Vácha el Příbram "Esperanto - lingvo de paco kaj amikeco".

La kolektoj estis prezentitaj en la kadro de internacia ekspozicio de poŝtmarkoj.

En septembro 1974 oni planas alian (5-an) renkontiĝon de esperanto-filatelistoj, en Opava, ankaŭ en kadro de internacia ekspozicio de pm.

APOGINTOJ DE ESPERANTO HONORIGATAJ PER
FRANCAJ POŜTMARKOJ (aldono kaj korekto al "Fe-
nikso" n. 25, p.2 kaj 3)

a) numeroj de la pm laù la katalogo Yvert & Tellier:
Henri FARMAN: pm 638 ne koncernas Farman. Nur va-
lidas 1670.

Albert THOMAS: oni devas legi 1600. Estas la "Inter-
nacia Labor-Oficajo" kiu ricevis la Nobel-premion pri
Paco. Bulteno de I.L.O. tute en Esperanto aperis, ĉiu
dumonate, kiel aldono al "ESPERANTO", organo de U.
E. A.

Edouard BRANLY: ekzistas du pm pri li: 599 kaj 1626.

Jean CHARCOT: pm 1259 ne koncernas Charcot.

Henri POINCARÉ: pm 933.

Prezidento COTY: pm 1412.

Marcellin BERTHELOT: pm 243 kaj aerpoŝto 3.

b) biografiaj notetoj:

Jules VERNE: li estis ankaŭ membro de la esperanti-
sta grupo de Amiens (ref. Tutmonda jarlibro esperan-
tista por 1904, paĝo 68)

Albert CALMETTE: li estis ankaŭ "membro aprobanto"
de la esperantista grupo de Lille. Tiutempe li estis di-
rektoro de la Instituto Pasteur de Lille (ref. Jarlibro
de la "Societo (franca) por la propagando de Esperan-
to" por 1903, p.38)

Prezidento Paul DOUMER: Li akceptis ~~patronadi~~
patronadi la 24-an U.K. (Parizo 1932), kaj eĉ propra
move li deklaris, ke li honorigos per sia ĉeesto la in-
aŭguran kunvenon, bedaŭrinde li estis murdita antaŭ
la kongreso (ref. "Gazeto de la XXIV U.K.)

Marcellin BERTHELOT: Ano de la patrona komitato
de la "Internacia Scienca Revuo". En la tripaĝa ne-
krologa artikolo, kiu aperis en "La Revuo" (n.9 -
majo 1907) C. Bourlet skribis: "Nia Majstro D-ro Za-

POSTAMPOJ PAROLAS ESPERANTE

Ankaŭ ĉi-jare, aperis specialaj poŝtstampoj kun teksto en Esperanto, aŭ kun mencio de esperanto-eventoj; ni ~~xi~~ citos ilin laŭ la dato de uzado.

En Rosario, Argentino, bela ilustrita stampo estis uzita la 21-an de aprilo, okaze de la Nacia Esperanto-Kongreso. La teksto, en hispana lingvo, indikas la aranĝon; la bildo prezentas urbajn monumentojn.

En Sopot, Pollando, sesangula (neregula) poŝtstampo en la internacia lingvo memorigis, la 24-an de aprilo, la 18-an Tutpollandan Esperanto-Kongreson; meze de la stampo troviĝas malhela, kvinpinta stelo.

Ankoraŭ en Pollando, en la urbo Poznań, du diversaj poŝtstampoj, en pola lingvo kaj en Esperanto, estis uzitaj la 10-an de junio, okaze de la tiea Internacia Foiro. Ambaŭ stampoj havas saman tekston ("Internacia Foiro en Poznań", ripetita ankaŭ en la pola), dum varias la bildoj, respektive vidaĵo de moderna konstruaĵo en la komerca urbocentro, kaj stilizita emblemo de la Foiro.

En Hungarujo, en Balatonboglar, la 10-an de junio rektangula ilustrita stampo memorigis la Printempan Internacian Renkontiĝon. La teksto estas dulingva, en Esperanto kaj en la hungara (en ĉi tiu lasta lingvo, la teksto ne koincidas, verŝajne, kun tiu en Esperanto). La bildo prezentas kvinpintan stelon kun litero E, kaj silueton de Balatona Lago.

Ankoraŭ en Hungarujo, dum julio (precizaj datoj ne konataj), estis uzita en Gyula poŝtstampoj okaze de la Somera Esperanto-Universitato. La teksto estas en Esperanto kaj en la hungara; la bildo prezentas blazonon, verŝajne de la urbo, kun la komencliteroj SEU, kaj kvinpintan stelon.

Same en Hungarujo, en la ripozloko Abaliget apud

Pécs, poŝtŝtampo memorigis dum julio (precizaj datoj¹ nekonataj) la Internacian Renkontiĝon de Esperantistaj Naturamikoj. La teksto estas nur en Esperanto; ĝi diras: "6-a Internacia Renkontiĝo Naturamika - IREN Abaliget". La bildo, jam tradicia, prezentas du manojn, kiuj sin premas, surfone de stilizita montaro kun floroj kaj malhela, kvinpinta stelo.

En Madrid, okaze de la 33-a Hispana Kongreso de Esperanto, estis uzita ronda ŝtampo en hispana lingvo; mi posedas ekzemplerojn kun la dato de la 21-a de julio, sed verŝajne la ŝtampo estis uzita dum pluraj tagoj. La skribaĵo mencias la aranĝon; interne de kvinpinta stelo aperas la numero 33.

En Beograd, Jugoslavia, okaze de la 58-a Universala Kongreso de Esperanto, estis uzita ronda ŝtampo; la teksto estas nur en Esperanto. La ŝtampilo estis uzita plenrajte nur la unuan tagon, la 28-an de julio; ek de la 29-a, ĝi estis uzebla nur memoraĵe, por privataj aldonŝtampoj, dum la afranko estis nuligenda per la normala poŝtkontora ŝtampilo. Tamen, la kongresa ŝtampilo restis je libera dispono de ĉiuj kongresanoj, kiuj mem iniciate uzis ĝin laŭ sia bontrovo, ne nur aldone, sed ankaŭ sur la poŝtmarkoj de kovertoj/kartoj ne efektive senditaj, kaj ne nur en nigra koloro (la sola oficiala), sed ankaŭ en la verda (kaj eble ankaŭ en aliaj). Krome, preskaŭ ĉiuj ŝtampoj estas malklare legeblaj kaj nebelaspektaj, nur sporade oni trovas taŭgajn ekzemplerojn. Entute, malagrabila situacio el filatela vidpunkto, des pli bedaŭrinda, ĉar la anoncita porokaza poŝtmarko ne aperis (laŭ onidiroj, oni petis ĝin tro malfrue).

Dum la oficiala Postkongreso en Ateno, Grekujo, oni vendis aerpoŝtajn kovertojn kun ŝtampo en Esperanto kaj en la greka, ~~ku~~ kiu diras: "Oficiala Esperanto-Postkongreso Ateno". Aperas granda kvinpinta stelo. La ŝtampo, kiu havas la daton de la 8-a de aŭgusto, 1

ne estis publike uzita; laŭ deklaro de la prizorginto, ekzistas nur 1.000 kovertoj, ĉiuj egalaj. Ankaŭ ĉi-foje, neaprobinda situacio.

En Kameoka, Japanujo, la 12-an de aŭgusto estis uzita speciala ronda stampo (en la kutima ruĝbruna koloro) okaze de la 60-a Japana Kongreso de Esperanto. La bildo montras ŝtonmonumenton kun la esperantlingva skribaĵo "Unu Dio, Unu Mondo, Unu Interlingvo". Kiel sciante, ja, Kameoka estas centro de la religia movado "OOMOTO". Skribaĵo en japana lingvo verŝajne mencias la kongreson.

En Poděbrady, Ĉeĥoslovakujo, la 24-an de aŭgusto estis uzita bela ronda stampo, kun ĉeĥa skribaĵo pri "Esperanta ŝakturniro", ŝaktabulo kaj ŝakpeco.

La 16-an de septembro, en la itala urbo Trento estis uzita bela ilustrita ronda stampo kun la skribaĵo en itala lingvo "44-a Itala Kongreso de Esperanto". La bildo montras la urban monumenton al Dante Alighieri, patro de la itala normlingvo kaj simbolo de rezisto (sub la aŭstra regado de Trentolando) kontraŭ la subpremado de lingvaj minoritatoj; en la fono, vidigas kvinpinta stelo.

La supraj informoj estis kolektitaj dank'al la afabla kunlaboro de multaj AREK-anoj, kiuj sendis sciigojn kaj materialon. Apartan dankon mi ŝuldas al: GIL, MAJEWSKI, VAŅA, TICHY, LINDSTRÖM, CHAPPELLIER, AMOUROUX, BIELAK, CHAMARET, SIMON, WASILEWSKI, LEVIĈAROV, TÓTH, BIESIDA, WLUKA, PRODANESCU, SOBIECH, HASALA.

Antonio DE SALVO, Roma (Italujo)

Mi daŭre aĉetas, interŝanĝas kaj vendas specialajn poŝtstampojn kaj tutaĵojn pri ĉiuj temoj, el ĉiuj landoj kaj epokoj. D-ro Antonio DE SALVO, via Olbia 15, I-00182 ROMA (Italujo).

PRI KELKAJ POLAJ STAMPOJ

Dum la 8-a U.K. en la jaro 1912, krakova ĉefa poŝtoficejo speciale aranĝis la Kongresan Poŝtoficejon en la apuda domo ĉe la kongresejo, speciale por la uzo de la kongresanoj. Nur tiu poŝtejo uzis tiam en Krakovo tiun specialan datstampon esperantan. Pri tio oni skribas ja tute oficiale en la kongresa libro, kaj ankaŭ en la granda monografia verko pri pola filatela movado kaj ankaŭ pri nia urbo Krakovo, ki~~u~~ fakte estas naskiĝurbo de pola filatelio! Estas ankaŭ oficialaj informoj en la presaro ĉi-rilate, ktp.

Se temas pri datstampo el Sopot 1972 okaze de la 60-jara datreveno de la unua esperanta poŝtstampo, ĝi ankaŭ estas oficiala, poŝta stampo, uzita nur en la loka poŝtoficejo. Sed ĉe ni regas ordonoj, kiuj diras, inter alie, ke oni ne permesas eldoni en unu loko pli ol 4 poŝtstampojn en la jaro; ĝuste en Sopot oni trapasis tiun limigitan ~~m~~ limon, kaj nur pro tio la stampo ne estis uzita kiel la plenrajta poŝtstampo, per kiu oni nuligas la poŝtmarkojn sur la korespondaĵoj. Oni decidis finfine - post multaj riproĉoj fare de lokaj filatelistoj kaj esperantistoj - permesi tiun stampon, kiel reklaman apudstampon por celoj pure propagandaj. Ĝi estis uzita nur en la nigra koloro kaj projektis ĝin nia kolego el Sopot Józef GOLEC.

Ankaŭ la stampo el Sopot de 1947 (unua E-poŝtstampo postmilite!) estas oficiale poŝta stampo, kvankam ĝi estas kolora! Ĝi estis uzita en nigra kaj viola koloroj.

Koncerne la vortojn de kol. BURMEISTER, mi interparolis kun li ~~per~~ persone pri multaj aferoj en Krakovo dum nia renkontiĝo, kaj mi bone komprenas lian singardemon kaj seriozecon ĉi-rilate; ĝenerale mankas al ni oficialaj konfirmoj pri diversaj stampoj, kaj pro tio (speciale, se temas ĝuste pri polaj stampoj) ekzistas multaj filatelistoj, kiuj aŭ neas la stampojn, aŭ

ne havas opinion pri ili. La problemo estas vere malfacila, kaj mi pensas, ke nur poloj povas klarigi multajn dubindaĵojn - ĉar ~~ekzistas~~ ekzistas tiaj -. Ĝuste pri la samaj aferoj okupiĝas la Pola Filatela Asocio-Klubo "Esperanto" en Krakovo.

Marian KOSTECKI, Kraków (Pollando)

NOVAJ MEMBROJ

Ni bonvenigas:

56. Anton STRAIF, ĉ Siedlerstr. 14, A-4300 ST. VALENTIN (Aŭstrujo); kol.: pm, sta;
57. Vladimir HASALA, S.K.N. 37, ĈSR-695 O3 HODONÍN (Ĉeĥoslovakujo); kol.: E-insignoj, sta;
58. Gligorov GALESKI, Pelisterska 4, Yu-97500 PRILEP (Jugoslavio); kol.: sta, glm.

KELKAJ NOVAJ GLUMARKOJ

En Francujo (sendis AMOUROUX) aperis grandformata memgluebla marko por montrofenestroj aŭ aŭtomobiloj okaze de la jarkongreso de la esperantistoj de la federacio "Langvedoko-Ruziljono" kaj printempa kunveno de la francaj esperantistaj fervojistoj, en la urbo ALES. La skribaĵo estas en franca lingvo (Esperanto/congrès/régional/Languedoc-Roussillon/réunion de printemps des/cheminots esperantistes/Ales (Gard)/7 et 8 Avril 1973). Bildo de lokomotivo kaj stelo.

En Trento estis eldonita glumarko kun la emblemo de la 44-a Itala E-kongreso (monumento al Dante kaj verda stelo) kaj E-lingva skribaĵo: "Itala/Esperanto/Kongreso/Trento/15 - 22/Sept/1973".

Propagande al la venontjara U.K. en Hamburgo, Okcid. Germanujo, aperis glm en koloroj verda kaj ruĝa sur blanka fono. La teksto, en E-o, diras: "59-a Universala Kongreso de Esperanto/Hamburgo 1974". La bildo ~~montras~~ montras konstruaĵon kaj stelon.

PASTRO LORENZO PEROSI

La 28-an de novembro 1972 Vatikano eldonis poŝtmarkon (en sufiĉe alta valoro de 180 liroj) omaĝe al la 100-jara datreveno de la naskiĝo de la itala komponisto pastro Lorenzo PEROSI; la 20-an de decembro 1972 ankaŭ Italujo memorigis filatele la eventon, per 2 pm-oj, respektive en valoro de 50 kaj 90 liroj. Ĉiuj 3 pm-oj prezentas portreton de la komponisto (tiu vatikana, montras surfone muziknotojn kaj aŭtografon).

Pastro Lorenzo PEROSI, naskiĝinta en Tortona, jam en sia junaĝo montris apartan talenton por muziko; estris dum multaj jaroj famajn religiajn korusojn (S. Marko-Kapelon en Venecio kaj Sikstan Kapelon en Vatikano), kaj estis, inter 1895 kaj 1915, la plej famkonata religia komponisto. En 1915 devis interrompiĝi lia aktiveco, pro serioza nerva malsano, el kiu li ne plu saniĝis (kvankam li daŭrigis sian kreadon ĝis 1954, kiam li mortis). La granda muzikologo Romain ROLLAND skribis pri li en 1899: "Estas kun granda ĝojo, ke mi salutas la ekstaron de pastro Perosi. Li havas 26 jarojn. Malalta, tre juneca, la kapo iom tro granda kompare kun la korpo, malfermita vizaĝo lumigita de inteligentaj nigraj okuloj. Li estas tre simpla, kore elverŝema, kaj kortuŝe modesta. . . Li kunigas, en siaj komponaĵoj, la gregorian kanton, la renesancan muzikon, antikvan tradicion". En epoko de dekadenco de la religia muziko, Perosi vigle kontribuis al ĝia renaskiĝo. La stilo kaj la spontaneco de lia muziko klarigas lian popularecon; la kredo, la bonkoreco, la sincereco de la pastro-muzikisto estas plene troveblaj en lia muziko.

Sed kial ni memorigas pastron Perosi kiel esperantistoj? Certe ne ĉar (feliĉa hazardo!) li estis iusence malkovrita de Kardinalo Sarto, la posta Papo

Pio X, protektanto de la Esperantistoj, kiu vokis lin al la estrado de la S. Marko-Kapelo en Venecio), sed ĉar P. Perosi... havis kontaktojn kun Esperanto! Leginte pri tio en la nacilingva gazetaro (revuo "Famiglia Cristiana" n. 38/sept. 1972), mi skribis leteron al la lasta SEKRETARIO DE Perosi, Mons. Teodoro ONOFRI, petante informojn kaj konfirmojn. Li skribis al mi, interalie, la 5-an de junio 1973: "Mi ne povas doni pliajn detalojn pri la hobia - ni nomu ĝin tiel - de pastro Perosi pri modernaj lingvoj, inter kiuj li flegis Esperanton. Por ĉi tiu li havis apartan preferon, ĉar li opiniis, ke universala lingvo estas unuaranga rimedo por kunigi kaj fratigi la homojn. Ĉiuj scias, mi opinias, pri lia angoro, lia timo pro la milito, kaj lia arda deziro de paco universala kaj stabila. Koncerne lian skribmanieron (inspiritan, oni supozas, de la fonetika esperanto-alfabeto), jen ekzemplo, kiun mi transkribas el aŭtografoj, kiujn mi posedas (la frazo troviĝas fine de pluraj liaj komponaĵoj, verkitaj en la periodo, kiam li perdis sian fraton Kardinalon Karlon): "Tristezza infinita per la morto del fratello Karlo" (senfina malĝojo pro la morto de la frato Karlo). Kaj jen letero al lia amiko mons. Chesò: "Karo Giovanni Battista Keso, per la morto del fratell Karlo avere deciso di non lascare kosì presto Romm. Al eterna memoria di mia Madre e di mio Fratell volere kredere me M. Lorenzo Perosi" (kara G. B. Chesò, pro la morto de frato Karlo mi decidis ne tiel frue lasi Romon. Je eterna memoro de mia frato kaj mia patrino bv kredi min M. L. P.). Estas substrekitaj la literoj, kiuj ricevis influon el la E-alfabeto.

En E-varbilo estas skribite, ke Perosi eldiris (sed mi ne povis tion kontroli): "Se oni devus muzikigi himnon al la Paco, mi taksus plej taŭga "La Espero"-n de Zamenhof". Ant_onio DE SALVO, Roma